# 109-a Universala Kongreso de Esperanto



Aruŝo, Tanzanio
3 — 10 aŭgusto 2024

**DUA BULTENO**

**KONGRESA TEMO**
Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo

# Enhavo

Bonvenon al la kongreslando ....................4
La kongresejo ....................6
Utilaj informoj pri Tanzanio kaj Aruŝo ....................7
Provizora programo ....................11
Kongresa temo ....................12
KER-ekzamenoj de UEA ....................13
Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado ....................14
Hoteloj ....................17
Ekskursoj ....................20
  Antaŭkongresaj ekskursoj ....................20
  Postkongresaj ekskursoj ....................24
  Ekskursoj dum la kongresa semajno ....................27
    Tuttagaj ekskursoj ....................27
    Duontagaj ekskursoj ....................31
  Tabelo de dumkongresaj ekskursoj ....................34
Bankedo ....................35
Aranĝoj ĉirkaŭ la UK ....................36
Pliaj informoj ....................36
Sekvu nin ....................37
Kontaktoj ....................38

# Loka Kongresa Komitato (LKK)

**Prezidanto:** Costantine Mashauri
**Vicprezidanto:** Charles Hiza
**Sekretario:** John Magessa
**Kasisto:** Gendo Francis

Jayrous Eliakimu
Mramba Simba
Nyambona Masamba
Paul Kusaya
David Mapengo
Mulele Mbassa
Aloyce Ambrose
Minani Matabaro
Nyabange Chirimi
Lazaro Filipo
Eusebia Mathias

Ranja Robertine Jeanne d'Arc Zafinifotsy

109-a Universala Kongreso de Esperanto

Aruŝo, Tanzanio, 3 — 10 aŭgusto 2024

# DUA BULTENO

KONGRESA TEMO

## Lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo

# Bonvenon al la kongreslando



### Dokumentoj, vizoj

Kongresanoj mem zorgas pri akiro de vizoj.

Ĉiuj bezonataj reguloj troviĝas ĉe *https://visa.immigration.go.tz/guidelines* (angle).

Eblas ricevi la vizon surloke aŭ peti ĝin anticipe rete.

Civitanoj de kelkaj landoj (listigitaj en "*LIST OF COUNTRIES WHOSE NATIONALS REQUIRE REFERRAL VISA*" en la supra retejo) ne povas ricevi vizon surloke kaj devas peti ĝin anticipe. Al ili oni rekomendas vizpeti 6 semajnojn antaŭ la vojaĝo.

Oni rekomendas al ĉiuj ajnokaze peti la vizon rete, malgraŭ la eblo ricevi ĝin surloke. Se oni vizpetas rete, kutime oni ricevas vizon ene de 10 tagoj.

Por peti vizon oni atentu uzi nur la oficialan retejon *https://visa.immigration.go.tz* kaj ne aliajn similaspektajn retejojn de turismaj agentejoj.

Bezonataj dokumentoj por peti interrete unufojan vizon (*ORDINARY VISA* (*SINGLE ENTRY VISA*)):

- Pasporto
- Kopio de la 2-a paĝo de la pasporto (kun pli ol 6-monata valideco)
- Fotokopio de la revena flugbileto
- Formularo taŭge plenigenda (ricevebla ankaŭ ĉe la flughavenoj)
- Viza monsumo 50 USD.

Civitanoj de Usono havas specialajn regulojn: ili devas ĉiam peti ne unufojan, sed plurfojan vizon (*Multiple Entry Visa*) pro la specialaj interkonsentoj inter Tanzanio kaj Usono. Tia vizo kostas 100 USD.

La tanzania vizo sufiĉas por eniri Zanzibaron.

Tanzania foririmposto: necesas pagi foririmposton en la valoro de 20 USD aŭ 20 EUR ĉe la flughaveno, kiam oni foriras de Tanzanio. Ofte ĝi estas enkluzivigita en la prezo de la flugbileto.

### Asekuroj

Por trankvila restado konsilindas havi vojaĝ-sanasekuron. Eventuale neantaŭviditaĵo kiel sanproblemo, nuligo aŭ perdo de pakaĵo povas okazi en malĝusta momento. Vojaĝasekuro ebligas al vi bone protektiĝi dum la restado en Tanzanio kaj Zanzibaro.

UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj.

### Vakcinoj

Vakcino kontraŭ la flava febro ne plu estas oficiale deviga (krom se vi venas el lando en Afriko aŭ Sudameriko en kiu la flava febro estas endemia, eĉ se vi pasigis tie nur 12 horojn, kio estas la kazo de Kenjo), sed rekomendindas.

Kontraŭmalariaj medikamentoj kiel prevento estas rekomendindaj, precipe por vizitanto, kiu intencas pasigi pli ol 2 semajnojn en Tanzanio. Oni nepre konsultu tion kun sia kuracisto.

## Alveno al Aruŝo kaj al la kongresejo

**Aruŝo havas 2 flughavenojn:**

**Flughaveno Arusha** (ARK – Arusha Airport, ĉ. 10 km for de la kongresejo, ĉ. 25 min per aŭto) – tio estas enlanda flughaveno (ĝi servas nur konektojn ene de Tanzanio, ekz. Aruŝo-Darelsalamo, aŭ Aruŝo-Zanzibaro).

**Flughaveno Kilimanjaro** (JRO – Kilimanjaro International Airport, ĉ. 50 km for de la kongresejo, 1 horo per aŭto) – tio estas internacia flughaveno, al ĝi venas aviadiloj ĉefe de eksterlando.

Al la urbo Aruŝo eblas de la flughaveno Kilimanjaro veturi per aŭto (taksio). La transporto por unu persono kostas 50 USD. Uzante en sia poŝtelefono la apon Bolt vi povas atingi malpli kostan veturebion – eĉ ĝis duona prezo de ordinara surloka taksio. Bolt funkcias ankaŭ rekte en Aruŝo, do ĝi povus esti utila kiel malpli kosta veturebleco.



Por plifaciligi la alvenon de tiu ĉi flughaveno al la kongresejo estos proponita komuna veturigo – bv. mencii detalojn pri via alflugo en la reta mendilo, se vi interesiĝas pri tiu servo.



# La kongresejo

La kongreso okazos en la Aruŝa Internacia Konferenca Centro (AICC), posedaĵo de la tanzania registaro, kun pli ol 40 jaroj da ekzistado. La domo estas rekonata kiel la precipa kongresejo en Tanzanio, kun diversaj kunvenejoj, kiuj povas gastigi konferencojn, laborrenkontiĝojn, seminariojn kaj komitatkunvenojn. La provizo de konferencaj servoj estas la kernaj aktivaĵoj de la domo.

## La adreso estas:

**Arusha International**
**Conference Centre (AICC)**
**Barabara ya Afrika Mashariki**
**PO Box 3081**
**Arusha Tanzania**

Por kongresrilataj aferoj bv. skribi nur al kongresoj@co.uea.org.








# Utilaj informoj pri Tanzanio kaj Aruŝo

### Situo



Tanzanio estas orient-afrika lando ĉe bordo de la Hinda Oceano en la tropika parto de la Suda Hemisfero. Ĝi estas ĉirkaŭita norde de Kenjo kaj Ugando, okcidente de Ruando, Burundo kaj Demokratia Respubliko Kongo, sudokcidente de Zambio kaj Malavio kaj sude de Mozambiko. La lando kovras 945.087 km² kaj havis pli ol 63,59 milionojn da enloĝantoj en 2021, ĉefe bantuaj. La ĉefurbo Dodomo troviĝas ĉe la koro de la lando, sed la ĉefa ekonomia centro estas la iama ĉefurbo Daresalamo ĉe la marbordo.

La nuna Tanzanio naskiĝis de la kuniĝo de Tanganjiko kaj Zanzibaro la 26-an de aprilo 1964, iom post iliaj respektivaj sendependiĝoj de Britio en 1961 kaj 1963. Tanganjiko fariĝis membro de la Brita Ŝtatkomunumo kaj de Unuiĝintaj Nacioj en 1961, kaj la nova Tanzanio heredis ambaŭ membrecojn.

### Aruŝo

Fondita en la 1830-aj jaroj, Aruŝo (Arusha) spertis plurajn reĝimŝanĝojn. Konkerita de la germanoj en la 1890-aj jaroj kaj reprenita de la britoj dum la 1-a mondmilito, la urbo fariĝis tanzania okaze de la landa sendependiĝo en la 1960-a jaro. La nuna Aruŝo estas multkultura urbo kun diversdenevaj homoj. La plimulto da enloĝantoj estas tanzanianoj, sed ankaŭ estas eŭropanoj, amerikanoj, azianoj kaj aliaj. Entute pli ol 400 mil homoj loĝas en la urba zono, kun pliaj en la kampara regiono. La urbo estas vivoplena, kun multaj rimarkindaj distriktoj kaj interesaj areoj, kun bazaroj, kafejoj, trinkejoj, restoracioj, muzeoj, kulturaj heredaĵoj kaj multe pli!

Aruŝo estas konata ankaŭ kiel internacia diplomatia centro, la hejmo de multaj industrioj kaj komercaj organizoj, inkluzive de bankoj, produktantoj kaj turismo. Ĝi staras ĉe la mezo de Afriko (de sudo al nordo), ĉar troviĝas centre inter Kaburbo en Sudafriko kaj Kairo en Egiptujo. En la urbo Aruŝo sidejas Orient-Afrika Komunumo, Tut-Afrika Poŝta Unio (PAPU) kaj aliaj. Gastas en la urbo multaj internaciaj organizoj de Unuiĝintaj Nacioj kiel Afrika Kortumo por Homaj Rajtoj (ACHPR), Afrika Instituto de Internacia Juro, Konsilia Estraro de Afrika Unio pri Korupto, Orientafrika Komunumo (EAC), San-Komunumo (ECSA), Orient-Sudafrika Lerna Instituto (ESAMI).

### Lingvoj

La oficialaj lingvoj estas la svahila kaj la angla, sed la araba estas ankaŭ parolata, precipe en la insuloj Zanzibaro kaj Pembo.

**Klimato**

Tanzanio havas tropikan klimaton ĉe la marbordo kaj pli mildan en la centraj altebenaĵoj. Averaĝaj temperaturoj en julio kaj aŭgusto estas inter 18°C kaj 23°C. En tiu periodo pluvoj estas maloftaj. La ĉielo estas sennuba, sunas. Tamen povas malvarmeti, eĉ malvarmi en vesperoj.

**Loka tempo**

UTC+03h00.

**Mono**





La oficiala tanzania mono nomiĝas tanzania ŝilingo (TZS). Monbiletoj: 1.000, 2.000, 5.000 kaj 10.000 ŝilingoj. Moneroj: 50, 100, 200 kaj 500 ŝilingoj. En la urbo estas bank-aŭtomatoj ĉe anguloj de stratoj. Tie eblas depreni monon. Ĉiuj hoteloj, restoracioj, vendejoj (krom la malgrandaj) akceptas bankokartojn (Visa kaj Mastercard estas la plej uzataj). Tamen estas konsilinde havi kun si kontantan monon (ĉu tanzaniajn ŝilingojn, ĉu usonajn dolarojn). Monŝanĝado okazas laŭ reguloj de libera merkato: aŭ kun fiksa servo-sumo je ordinara kurzo aŭ sen fiksa servo-sumo, sed je iom pli alta kurzo (kio konsilindas nur por ŝanĝado de etaj sumoj). Ekzistas ankaŭ monŝanĝejo nomata "Bureau de Change" en diversaj partoj de la urbo. Pluraj bankoj troviĝas rekte apud la monumento "Horloĝa turo" (*Clock tower*). Ankaŭ usonaj dolaroj estas vaste akceptataj. En hoteloj kaj pli grandaj vendejoj eblas pagi per karto.

1 € = 2.703,51 TZS

1 $ = 2.555,00 TZS

**Elektro**



La elektra tensio estas 220-volta (identa al tiu en Eŭropo). La elektringoj uzataj en Tanzanio estas de tipo D/G: 3 pingloj, 2 ebenaj horizontalaj kaj 1 vertikala.

**Telefonado**

Prefikso por telefoni de alilando al Tanzanio: +255, sekvata de kompleta telefonnumero, inkluzive de la nulo de la regiona kodo; prefikso por telefoni de Tanzanio al eksterlando: 00.

**Interreto**

Vifio estas kutima en hoteloj, gastejoj, restoracioj, sed ne surstrate. Se vi venas de eksterlando kaj dezirus havi interretkonekton ĉiam ĉe vi, ni tre rekomendas aĉeti lokan SIM-karton. Eblas aĉeti karton kun kredito – en valoro de 10.000 aŭ 20.000 TZS (4 aŭ 8 €) – laŭbezone sekve ĝin eblus reŝargi.

**Medikamentoj**

Se vi uzas preskribitan medikamenton, bonvolu kunporti kuracistan recepton aŭ la folieton, kiu akompanas la medikamenton kaj entenas ĝian kemian priskribon/nomon. Informoj haveblas ĉe la informa budo de la kongresejo.

**Sanservo**

Eksterlandanoj havu taŭgan konfirmilon pri sanasekuro. LKK kaj UEA ne respondecas pri asekuro de kongresanoj. Kaze de sanproblemoj aŭ medicina bezono oni anonciĝu en la informejo.

Tamen Aruŝo havas sufiĉe multe da malsanulejoj, kaj ili funkcias 24/7. Apud la kongresejo estas la plej granda kuracejo nomata *Mount Meru Referral Hospital*. Ĝi estas moderna kaj havas ĉiujn specialistojn.

Aruŝa Internacia Konferenca Centro, la kongresejo, posedas ankaŭ propran malsanulejon kun ĉio bezonata por la prizorgo de pacientoj.

**Trinkakvo**

La kranakvo **ne estas trinkebla**, oni devas boligi ĝin aŭ aĉeti botel(eg)ojn en vendejo. Kranakvon oni uzu por lavi sin, duŝi sin. La plej bona solvo estas trinki mineralan akvon, vendatan en enkapsuligitaj boteloj (prefere kontrolu, ĉu la botelo estas vere fermita – certiĝu, ke sigeloj sur akvoboteloj estas nerompitaj). En vendejoj, hoteloj kaj surstrate eblas aĉeti mineralan akvon. Duonlitra botelo da akvo en hotelo/restoracio kostas ĉ. 500 TZS (ĉ. 0,20 €).

**Trinkejoj**

La prezoj varias depende ĉu oni trinkas en surstrataj kioskoj aŭ en luksaj trinkejoj. La kromprezo povas esti nature pli alta. En ĉiu trinkejo (plejofte ĉe la verŝtablo) pendas tabulo-menuo, sur kiu estas indikitaj la prezoj de proponataj varoj. En restoracioj kutime oni disponigas menuon kun prezoj.




**Trinkaĵoj**

– Teo kaj kafo: loka teo, tre forta, estas ĉiam servata kun boligita kaj jam dolĉigita lakto. Se vi deziras ĝin, petu: "chai kavu" (ĉaj kavu). Kafo, ankaŭ produktata surloke, estas same traktata, sed troveblas ankaŭ kafejoj, kie mendeblas la ordinaraj espreso aŭ kapuĉino. Kapuĉino haveblas kontraŭ ĉ. 2 USD (5.100 TZS) kaj espreso kontraŭ 1,40 USD (3.500 TZS).

– Biero: bonaj bieroj estas vendataj preskaŭ ĉie (krom en Zanzibaro, en certaj lokoj, aparte regataj de striktaj islamanoj). Vi havas elekton inter *Safari* (sufiĉe forta), *Kilimanjaro* kaj *Castle Lager* (pli malpeza, kun malpli da ŝaŭmo).

– Vino: en la plej multaj restoracioj, krom la importita vino haveblas ankaŭ loka vino – bonvolu ne forgesi gustumi ankaŭ ĝin!

**Trinkmono**

Ĝi ne estas deviga, sed estas aprezata kaj kutima.

**Publika transporto**

Ekzistas liniaj busetoj kiel publika transporto en la urbo. Oni pagas al la ŝoforo – ne per kreditkarto, sed nur per kontanta mono. Unu direkta vojaĝo kostas inter 500 kaj 1.500 TZS, laŭ la vojdistanco. Ne ekzistas sistemo por antaŭaĉeti vojaĝbileton.

**Taksio**

Kalkulu ĉirkaŭ 3.000-5.000 TZS por enurba veturado, la prezo dependas de la daŭro de la veturado. La prezo estas diskutenda komence, sed pagu nur post kiam vi estos alveninta al via celo kaj post preno de viaj sakoj aŭ pakaĵoj de la aŭtomobilo. Multaj hoteloj kaj restoracioj estas je piedira distanco de la kongresejo.

Por mendi privatan transportilon eblas uzi la poŝtelefonajn apojn *Uber, Bolt, inDrive* k.s. La tarifo por unudirekta enurba veturado kostas malpli ol 3 USD. La ŝoforo kaj aŭto estas sub la kontrolo de la kompanio, kies apo estas uzata. Tiu veturmaniero estas sekura, malmultekosta kaj konsilinda. Pliaj informoj haveblas ĉe la informa budo en la kongresejo.

**Sekureco**

Tanzanio estas ĝenerale sekura lando. Kiel en ĉiuj grandaj urboj, estu atentema pri dokumentoj, valoraĵoj, mono ktp. Certiĝu, ke vi portas taŭgajn vestaĵojn laŭ la situacio, kaj apliku la bazajn sekurecajn regulojn por vojaĝantoj.

La urĝaj telefonnumeroj estas: 112 (polico), 111 (fajrobrigado) kaj 114 (medicina helpo).

**Vendohoroj**

La plej multaj grandaj vendejoj kaj magazenoj funkcias de la 8:30 ĝis la 21:00, ankaŭ sabate kaj dimanĉe. Aliaj grandaj vendejoj en la urbo funkcias de la 8:30 ĝis 17:00. Etaj vendejoj, aparte por turistoj, restas malfermitaj ĝis la 22:00 kaj ofte ankaŭ dimanĉe. Tri konataj superbazaroj estas: Njiro Complex, Shoppers kaj AIM Mall – kun vendejoj, manĝejoj kaj kinejo.

**Aruŝo piede**

La kongresejo troviĝas proksime al la urbocentro. En apudeco estas pluraj restoracioj, kafejoj. Eblas promeni sur la stratoj de Aruŝo libere kaj uzi guglan mapon, kiu povas gvidi vin, navigante al la celo. Oni povas alparoli la personojn surstrate. Homoj estas ĝenerale afablaj al turistoj kaj helpemaj, se oni parolas la anglan, aŭ la svahilan, ekz. Ne hezitu uzi guglo-tradukilon (aŭ similan servon): tajpi en via lingvo kaj traduki al la svahila aŭ la angla.



# Provizora programo

**Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.**

| | |
|---|---|
| **3-a de aŭgusto, sabato** | Malfermo de la kongresejo je 9h00. Registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00. |
| **4-a de aŭgusto, dimanĉo** | Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Kongresa Temo. Inaŭguro de IKU/AIS. Ekumena Diservo. Nacia Vespero. |
| **5-a de aŭgusto, lundo** | Libroservo. IKU-prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Societo Zamenhof. Bankedo. Kongresa Balo. |
| **6-a de aŭgusto, mardo** | Libroservo. Esperanto-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Koncerto/Teatraĵo. |
| **7-a de aŭgusto, merkredo** | Tuttagaj ekskursoj (kongresejo fermita). |
| **8-a de aŭgusto, ĵaŭdo** | Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Belartaj Konkursoj. Esperanto-kursoj. Koncerto/Teatraĵo. |
| **9-a de aŭgusto, vendredo** | Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. KER-ekzamenoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero. |
| **10-a de aŭgusto, sabato** | Solena Fermo (10h00). Fermo de la kongresejo (12h00). |



# Kongresa temo

## Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo

Lingvo estas komunikilo. Ĝi ebligas al ĉiuj esprimi siajn pensojn kaj sentojn diversmaniere: ĉu voĉe, signe aŭ grafike. Tiel ni povas transdoni mesaĝon al la esperantista kaj la neesperantista publikoj, kiuj legas, aŭskultas aŭ sekvas nin.

Lingvaj diferencoj estis kaj estas je la bazo de pluraj etnaj konfliktoj. Tiuj konfliktoj kreas murojn aŭ barojn inter homoj. Tio estas videbla en pluraj konfliktoj, kiuj kaŭzas milionojn da mortoj, vundoj kaj migrado tra la mondo.

Fronte al tiuj problemoj, Esperanto prezentiĝas kiel bona alternativo. La lingvo celas antaŭenigi pacon kaj interkompreniĝon inter homoj. Temas pri lingvo de malkovro, malferm(iĝ)o kaj de proksimigo inter ĉiuj homoj, ĉar ĝi ne ekskludas aliajn lingvojn. Esperanto estas uzata kiel lingvo por kultura kaj socia integriĝo. Dank' al ĝi, homoj lernas aliajn lingvojn, kiujn ili neniam malkovrus aŭ ne lernus. Aliaj personoj interesiĝas pri dialektoj dank' al Esperanto. Ekzemplas la kazo de la lernado de la evea lingvo (okcident-afrika lingvo, parolata en Togolando, Ganao kaj Benino) kaj la svahila (orient-afrika lingvo parolata de pli ol 200 milionoj da personoj). Tiu ĉi lasta estos instruata dum la kongreso en Aruŝo.

Per Esperanto ĉiuj esperantistoj sentas sin hejme ĉie kaj sekuraj en siaj persona kaj kultura identecoj. Tion ekz. ilustras Pasporta Servo. Estas adreslibro, kiu faciligas la senpagan gastigon de esperantistoj tra la mondo. Esperantistoj kunhavas komunajn valorojn, kiel respekto al la lingva kaj kultura diverseco, la antaŭenigo de la paco kaj la internacia kunlaboro, kaj la engaĝiĝo por daŭripova kaj solidara evoluigo.

Alfrontante regule problemojn de medio, kiel la naturaj katastrofoj, la klimat-ŝanĝiĝo, malapero de biodiverseco, poluado…, homoj pli kaj pli pridemandas kaj serĉas vojojn kaj rimedojn pri kiel vivi en harmonio kun la planedo. Tio en la penso certigi la pluekzistadon kaj bonfarton kaj de la medio kaj de ĉiuj vivaĵoj nunaj kaj estontaj en la universo.

Tanzanio estas taŭga gastiganto por tiu kongresa temo – la sola afrika lando, kie la loka lingvo svahila estas uzata oficiale en la lernoprogramo kaj en la publikaj instancoj. En la lando ankaŭ pluraj altnivelaj esploroj okazas rilate al medio. Tie ni oportune studos la fenomenon de lingvo kaj medio ankaŭ en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: pli bona mondo ĉiam instigas demandojn kaj esplorojn pri mediprotektado, biologia agrikulturo, uzo-neuzo de fosiliaj energioj, sana medio. Fine ni intencas analizi, kiun rolon ludu la Esperanto-movado por solvi problemojn okazantajn pro homaj agoj el vidpunkto de lingvo kaj klimat-ŝanĝiĝo.

Reĝisoro de la kongresa temo estas François Hounsounou (Benino). Vicreĝisoroj estas Espoir Kasati (D. R.

Kongo), Cyprien Guiya (Benino) kaj Miora Raveloharinson (Madagaskaro). Ĉiuj estas multjaraj esperantistoj kaj aktivas surloke pri Esperanto, lingvoj, homaj rajtoj kaj naturmedia agado. Por kontakti la reĝisoran teamon pri la kongresa temo skribu al *KongresaTemo@groups.io* – interesatoj ankaŭ povas aktive partopreni la diskutliston.



# KER-ekzamenoj de UEA

UEA denove planas okazigi dum la kongreso ekzamenojn, bazitajn je la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER).

La planataj niveloj estas **B1**, **B2** kaj **C1**. (C2-ekzameno okazos rete, la 16-an de novembro).

Atentu, ke la KER-Ekzamena Centro povos organizi ekzamenojn **nur je tiu nivelo, al kiu ĝis la 31-a de majo aliĝos minimume 5 personoj** kaj ilia pago atingis UEA ĝis la 10-a de junio.

**Bonvolu ne kalkuli je eblo surloke aliĝi al ekzameno.**

Okaze de sufiĉa nombro de aliĝintoj je ajna nivelo oni povos ekzameni la kandidatojn pri la **skriba kaj parola ekzamenpartoj**. Ĉi-lastaj konsistas el aŭdkomprenaj taskoj kaj antaŭkomisionaj buŝaj ekzamenoj (intervjuoj). La priskribo de la enhavo kaj la postularo pri la unuopaj ekzamenniveloj konsulteblas en la ekzamenpaĝo de *https://edukado.net/ekzamenoj/ker*.

La ĉefa ekzamentago estos **vendredo, la 9-a de aŭgusto**, kiam okazos laŭvice la skribaj kaj aŭdkomprenaj ekzamenoj je ĉiuj eblaj niveloj.

Aliĝilo: *https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj*

Ekzamenkotizoj varias laŭ la landkategorioj de la membrokotizoj de UEA. *https://edukado.net/ekzamenoj/ker/kotizoj*

Pri la pagenda sumo kaj pagmanieroj atendu la fakturon.

Por pliaj informoj skribu al: *ker-ekzamenoj@edukado.net*.



# Ĝeneralaj kondiĉoj de mendado

La kondiĉoj de mendoj kaj malmendoj estas priskribitaj en la reta mendilo kaj en la Dua Bulteno. Mendante, ĉiu kongresano akceptas tiujn kondiĉojn. Bonvolu nepre legi ilin antaŭ ol plenigi kaj sendi vian mendilon.

### Bazaj informoj

UK akceptas mendojn nur de registritaj kongresanoj. Registrita kongresano estas konsiderata tiu, kiu ricevis konfirmon pri sia aliĝo kun la kongresa numero. Kongresanoj indikas siajn personajn informojn, kaj UK ne respondecas pri eventualaj mismendoj kaŭzitaj pro manko aŭ malĝusteco de tiuj informoj. UK devigas sin liveri ĉiujn servojn laŭ la priskriboj en la Dua Bulteno kaj ne respondecas pri (ne)plenumo de nemenciitaj servoj.

### Loĝado

Kiel unuan loĝdaton oni kalkulas la daton de la alveno al la loĝejo (ekloĝo); se oni venas iam post noktomezo, kalkuliĝas la dato de la antaŭa tago. Kiel lastan daton oni kalkulas la daton de la foriro de la loĝejo, do, la daton de la lasta mateno en ĝi.

Principe, eblas okupi ĉambrojn ekde la 14h00 de la mendita dato kaj endas forlasi la ĉambrojn ĝis la 10h00 de la lasta tago. Se vi ne okupos ĉambron dum la unua mendita tago, oni nuligos la rezervon kaj vi perdos la plenan pagitan sumon por la tuta restadperiodo.

### Hazarda kunloĝigo

Eblas mendi 1 liton en kvarlitaj ĉambroj en la hotelo H3. Mendante ĝin, vi akceptas loĝi kun 3 aliaj kongresanoj en la ĉambro.

Dulitajn ĉambrojn oni disponigas nur al homoj, kiuj anticipe interkonsentis pri kunloĝado kaj menciis tion sur siaj mendiloj. Oni ĉiam fakturas la koston de plena ĉambro, eĉ se la kunloĝanto forestas dum iu(j) tago(j). Por faciligi la trovon de kunloĝanto al homoj, kiuj nepre volas loĝi en dulitaj ĉambroj sed ne havas kunloĝanton, ni rekomendas uzi la telegraman grupon de UK: *https://uk.telegramo.org/*.

### Frueco de la mendo kaj alternativoj

Ĉar la mendeblaj litlokoj ne estas senlimaj, kaj precipe ĉar la kongreso okazas dum la turisma sezono, gravas mendi kiel eble plej frue. Tial gravas, ke ĉe ĉiu mendo oni nepre menciu ankaŭ alternativajn loĝvariantojn, kiun la Kongresa Fako rezervos, se ne eblas plenumi la originan mendon. El la reta mendilo eblas scii, kiuj loĝejoj ankoraŭ havas liberajn lokojn.

### Ekskursoj

Ĉiuj ekskursoj startas de la kongresejo, krom se alie indikite (ĉu en la ekskursa priskribo, ĉu sur la ekskursa bileto). Bonvolu veni 15 minutojn antaŭ la indikita starthoro de la ekskurso. Ĉiujn ekskursojn akompanos Esperantlingvaj gvidantoj.

Kun la kongresaj dokumentoj ĉiuj mendintoj ricevos koverton kun la biletoj de la menditaj ekskursoj kun la bazaj informoj pri ili (dato, horo, buso), kiuj eventuale povos malsami ol tiuj, indikitaj en la Dua Bulteno. Kaze de malsameco validas la informoj presitaj sur la biletoj.

Ne forgesu preni ŝirmilon kontraŭ suno, vento kaj eventuale pluvo aŭ malvarmo. Bv. noti, ke kelkaj ekskursoj povas esti netaŭgaj por homoj kun marŝproblemoj; la priskribo de la ekskurso kutime mencias tion.

### Ekskursaj kondiĉoj

Ĉar la ekskursoj dependas de minimumo da partoprenantoj, la organizantoj rezervas al si la rajton eventuale nuligi ilin aŭ altigi la prezojn de iuj el ili. En tiuj kazoj ni klopodos averti vin kiel eble plej frue antaŭ la kongreso, por ke eblu ŝanĝi aŭ nuligi la ekskurso(j)n.

### Limdatoj

La limdato por mendi antaŭ- kaj post-kongresajn ekskursojn estas la 30-a de aprilo 2024. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj nepre kontraŭ krompago de 100 €. La limdato por mendi loĝadon estas 30-a de majo. Mendojn post tiu dato oni plenumos nur escepte kaj nepre kontraŭ krompago de 40 €.

La ceterajn ekskursojn kaj la bankedon eblos mendi ĝis la elĉerpiĝo de liberaj lokoj.

### Pago kaj konfirmo de mendoj

La mendojn oni traktos nur post la ricevo de la koncerna pago. Post la trakto la kongresano ricevas la konfirman mesaĝon de la Kongresa Fako.

Kiel daton de la mendoricevo oni konsideras la daton de la ricevo de la pago. Se la mendo ne estas plene pagita, bv. tuj pagi la diferencon. Se la ŝuldo estas malpli ol 20 €, oni povas pagi ĝin dum la UK.

### Malmendoj

Malmendoj devas esti skribaj (al *kongresoj@co.uea.org* aŭ per redakto de la reta mendilo). Ĉe malmendoj faritaj antaŭ la 1-a de majo oni ricevos la tutan mendosumon, minus 30 €



por la administraj kostoj. Ekde la 1-a de majo ne eblas ricevi repagon.

### Transdono de mendoj

Eblas transdoni pagitan mendon al alia kongresano ĝis la 10-a de julio. Por tio bezonatas skribi al *kongresoj@co.uea.org* kaj indiki, kiun mendon kaj al kiu oni transdonas. Post la trakto de la peto ambaŭ personoj ricevos novajn konfirmajn mesaĝojn kun la listo de menditaj servoj.

### Reklamacioj kaj repagoj

Ĉiuj reklamacioj kaj postuloj pri la repagoj (ekz. pro neliveritaj aŭ neuzitaj servoj, nepartopreno k.s.) devas esti faritaj skribe al kongresoj@co.uea.org kun la titolo "Reklamacio" antaŭ la fino de aŭgusto 2024. Se eblas, la reklamacion oni faru jam dum la UK.

Atente traleginte la priskribojn bv. elekti la servon kaj plenigi la retan mendilon.

### KIEL MENDI?

Ĉiu kongresano ricevas al sia retpoŝtkesto personan ligilon por la reta mendilo.

Uzante ĝin, eblas ankaŭ ŝanĝi sian mendon poste.

Ne hezitu kontakti la Kongresan Fakon per *kongresoj@co.uea.org* kaze de ajnaj demandoj.



# Hoteloj

Ĉiuj prezoj estas en eŭroj (€) por unu persono por unu nokto; p.p. = por persono.

UEA sukcesis interkonsenti tre favorajn prezojn, ni invitas vin mendi vian ĉambron kiel eble plej frue por garantii komfortan restadon je favora prezo dum la kongreso.

**H1 PALACE HOTEL ARUSHA ******
**400 m for de la kongresejo (6 min piede)**










*Makongoro Rd, Arusha*
Plej proksima hotelo al la kongresejo, ĝi situas en la urbocentro apud la Aruŝa Urba Ĝardeno, kaj estas je piedirdistanco de la ĉefaj turismaj vidindaĵoj.
Palace Hotel Arusha proponas komfortajn ĉambrojn kun senpaga retkonekto, fridujeto, televidilo, klimatizilo kaj sekurŝranketo. La prezo inkluzivas matenmanĝon. En la hotelo troviĝas ankaŭ kafejo kaj restoracio. Kontraŭ aldona kosto disponeblas sporta ekzercejo kaj ripozejo kun saŭno.
Ni rekomendas ĝin al personoj, kiuj ŝatus komforte loĝi proksime de la kongresejo kaj de la urbaj vidindaĵoj.

- Unupersona ĉambro: 126 €
- Dupersona ĉambro: 75 € p.p.

## H2 POINT ZONE RESORT ***

**1,7 km de la kongresejo (5-10 min per aŭto)**


*Mianzini (Tank la maji), Arusha*









La hotelo situas proksime de la ĉefa vojo de Aruŝo, plej komfortas uzi taksion por atingi la kongresejon (veturo kostas ekde 1,50 € per la apo Bolt). La hotelo disponas je komfortaj klimatizitaj ĉambroj kun senpaga retkonekto, televidilo, fridujeto, skribotablo kaj sekurŝranketo. En la hotela restoracio estas servata matenmanĝo (inkluzivita en la prezo).

Ni rekomendas ĝin al personoj kiuj ŝatus loĝi komforte, kaj por kiuj taŭgus veturado per taksio.

- Unupersona ĉambro: 69 €
- Dupersona ĉambro: 41 € p.p.

### **H3 KIZUMBA HOUSE**

**1 km for de la kongresejo (15 min piede)**

*Kanisa road 1, Arusha*






Tiu ĉi hostelo situas je pieddistanco de la kongresejo, la urbocentro kaj turismaj vidindaĵoj.

Ĝi proponas 4-personajn ĉambrojn kun etaĝaj litoj kaj banĉambro. En la hostelo troviĝas komuna teraso, trinkejo, kaj restoracio, kie estas servata baza matenmanĝo (inkluzivita en la prezo). La prezo inkluzivas ankaŭ bantukojn, litotolaĵojn kaj senpagan retkonekton.

En tiu ĉi hostelo estas multe da ekstera komuna loko, kie estas planita vespernokta junulara programo.

Ni rekomendas tiun ĉi hostelon specife al junuloj kaj al personoj junanimaj, por kiuj taŭgas etaĝaj litoj, kaj kiuj ŝatus loĝi proksime al la kongresejo en la junulara etoso.

- Loko en 4-persona ĉambro: 13,5 € p.p.

# Ekskursoj

## Antaŭkongresaj ekskursoj

Tanzanio estas konata pro siaj safariaj ekskursoj, dum kiuj vi veturas laŭ la naciaj parkoj per specialaj aŭtoj (kutime 7-personaj) kaj havas la ŝancon vidi plurajn bestojn en ilia natura vivejo. Ni tre rekomendas viziti almenaŭ unu nacian parkon dum via restado en Tanzanio.

Se la sinsekvo de la vizitindaĵoj dum la ekskursoj ne povos okazi laŭ la priskribo, alternativoj estos proponataj. Pri la eventuala nuligo de programero(j) pro kialoj ekster la homa rego UEA ne respondecos. La partoprenantoj devas memstare atingi la lokojn de la komenco de la antaŭkongresaj ekskursoj kaj memstare vojaĝi al la (flug)haveno por foriri hejmen, fine de la postkongresaj ekskursoj.

Ĉiu partoprenanto respondecas pri la informo al UEA de siaj nomoj kiel enskribitaj en la pasporto (oni povas esti rifuzita en la ekskursoj se la nomo sur la mendolisto ne kongruas kun tiu en la pasporto).

**Ĉiuj antaŭkongresaj ekskursoj:**

- komenciĝas en Aruŝo, nepre necesas alveni al Aruŝo minimume la antaŭan tagon
- finiĝas en Aruŝo la 2-an de aŭgusto, vendrede vespere, necesas almendi tranokton

**La prezo inkluzivas:**

- restadon en komfortaj tendaraj hoteloj en naciaj parkoj;
- matenmanĝojn, tagmanĝojn, vespermanĝojn (krom matenmanĝo la 1-an tagon kaj vespermanĝo la lastan tagon);
- transporton per terenaj aŭtomobiloj, aŭ turisma bus(et)o;
- ĉiujn bezonatajn enirbiletojn;
- Esperantan interpretiston.

**La prezo ne inkluzivas:**

- tranoktojn en Aruŝa antaŭ kaj post la antaŭkongresa ekskurso;
- matenmanĝon la 1-an tagon kaj vespermanĝon la lastan tagon;
- hotelajn ekstraĵojn;
- asekuron;
- trinkmonon al la loka gvidanto (rekomendinde 10 USD je tago/persono).



## AK1 Naciaj Parkoj: Serengeti kaj Ngorongoro

*30-a de julio – 2-a de aŭgusto*
*Mardo ĝis vendredo, 4 tagoj / 3 noktoj*









Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos du naciajn parkojn – Serengeti kaj Ngorongoro. Serengeti estas la plej konata nacia parko, fama pro abundeco de bestoj kaj pitoreskaj pejzaĝoj. Ĉi tie vi havos la ŝancon vidi la bestojn de la "*Big 5*" – leonojn, rinocerojn, leopardojn, elefantojn kaj bubalojn. Ni esperas, ke vi vidos ilin ĉiujn! En ambaŭ parkoj estas ankaŭ aliaj bestoj kaj riĉa flaŭro.

**30.07** Vojaĝo de Aruŝo al la Nacia Parko Serengeti, tagmanĝo, vizito de parko, vespermanĝo, tranokto.

**31.07** Matenmanĝo, tuttaga vizito de parko kun tagmanĝo, vespermanĝo, tranokto.

**1.08** Matenmanĝo, matena vizito de parko, tagmanĝo, vojaĝo al proksimeco de Ngorongoro, vespermanĝo, tranokto.

**2.08** Matenmanĝo, vizito de la Nacia Parko Ngorongoro, tagmanĝo, reveno al Aruŝo vespere.

**Prezo:**


- en unupersona ĉambro po 1590 €
- en dupersona ĉambro po 1390 € p.p.

## AK2 Tri naciaj parkoj kun vizito al triboj

*30-a de julio – 2-a de aŭgusto*
*Mardo ĝis vendredo, 4 tagoj / 3 noktoj*









Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno. En la parkoj oni veturos per specialaj aŭtoj kaj havos la ŝancon vidi multajn bestojn – ekz. bubalojn, ĝirafojn, leonojn, elefantojn, simiojn, zebrojn. Aldone vi vizitos setlejojn de du tanzaniaj triboj – hadzoj kaj datogoj – kaj ili konatigos vin kun sia riĉa kulturo kaj tradicioj.

**30.07** Vojaĝo de Aruŝo al la Nacia Parko Lago Manyara, tagmanĝo, vizito de la parko, vespermanĝo, tranokto.

**31.07** Matenmanĝo, vojaĝo al la Nacia Parko Ngorongoro, tagmanĝo, vizito de la parko, vespermanĝo, tranokto.

**1.08** Matenmanĝo, vojaĝo al la lago Eyasi, tagmanĝo, vizito de setlejoj de hadzoj kaj datogoj, vespermanĝo, tranokto.

**2.08** Matenmanĝo, vojaĝo al la Nacia Parko Tarangire, tagmanĝo, vizito de la parko, reveno al Aruŝo vespere.

**Prezo:**

- en unupersona ĉambro po 1190 €
- en dupersona ĉambro po 990 € p.p.

# AK3 Tri naciaj parkoj en tri tagoj

*31-a de julio – 2a de aŭgusto*
*Merkredo ĝis vendredo, 3 tagoj / 2 noktoj*









Tiu ĉi safaria ekskurso similas al AK2, sed estas unu tagon malpli longa kaj ne enhavas viziton de tanzaniaj triboj. Dum tiu ĉi ekskurso vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno. En la parkoj vi veturos per specialaj aŭtoj kaj havos la ŝancon vidi multajn bestojn – ekz. bubalojn, ĝirafojn, leonojn, elefantojn, simiojn, zebrojn.

**31.07** Vojaĝo de Aruŝo al la Nacia Parko Lago Manyara, tagmanĝo, vizito de la parko, vespermanĝo, tranokto.
**1.08** Matenmanĝo, vojaĝo al la Nacia Parko Ngorongoro, tagmanĝo, vizito de la parko, vespermanĝo, tranokto.
**2.08** Matenmanĝo, vojaĝo al la Nacia Parko Tarangire, tagmanĝo, vizito de la parko, reveno al Aruŝo vespere.

**Prezo:**

- en unupersona ĉambro po 970 €
- en dupersona ĉambro po 770 € p.p.

# Postkongresaj ekskursoj

## PK1 Tri naciaj parkoj

*11-a – 13-a aŭgusto*
*Dimanĉo ĝis mardo, 3 tagoj / 2 noktoj*









Tiu ĉi safaria ekskurso ripetas la antaŭkongresan ekskurson AK3.

Dum ĝi vi vizitos tri belegajn naciajn parkojn – Lago Manyara, Ngorongoro kaj Tarangire, famajn pro siaj riĉaj flaŭro kaj faŭno. En la par-koj vi veturos per specialaj aŭtoj kaj havos la ŝancon vidi multajn bestojn – ekz. bubalojn, ĝirafojn, leonojn, ele-fantojn, simiojn, zebrojn.

Tiu ĉi ekskurso komenciĝos en Aruŝo la sekvan tagon post la fino de la Kongreso – dimanĉe la 11-an de aŭgusto. Nepras mendi la aldonan tranokton en Aruŝo!

La ekskurso finiĝos la 13-an de aŭgusto en Aruŝo, do necesas plani alhejman vojaĝon de tie (ekz. flugo la 14-an de aŭgusto), ev. plian tranokton (de la 13-a al la 14-a de aŭgusto).

**La prezo inkluzivas:**

- restadon en komfortaj tendaraj hoteloj en naciaj parkoj;
- matenmanĝojn, tagmanĝojn, vespermanĝojn (krom matenmanĝo la 1-an tagon kaj vespermanĝo la lastan tagon);
- transporton per terenaj aŭtomobiloj, aŭ turisma bus(et)o;
- ĉiujn bezonatajn enirbiletojn;
- Esperantan interpretiston.

**La prezo ne inkluzivas:**

- tranokton la 10-an de aŭgusto (antaŭ la komenco de la ekskurso);
- tranokton la 13-an de aŭgusto (post la reveno de la ekskurso);
- matenmanĝon la 1-an tagon kaj vespermanĝon la lastan tagon;
- hotelajn ekstraĵojn;
- asekuron;
- trinkmonon al la loka gvidanto (rekomendinde 10 USD je tago/persono).

**11.08** Vojaĝo de Aruŝo al la Nacia Parko Lago Manyara, tagmanĝo, vizito de la parko, vespermanĝo, tranokto.
**12.08** Matenmanĝo, vojaĝo al la Nacia Parko Ngorongoro, tagmanĝo, vizito de la parko, vespermanĝo, tranokto.
**13.08** Matenmanĝo, vojaĝo al la Nacia Parko Tarangire, tagmanĝo, vizito de la parko, reveno al Aruŝo vespere.

**Prezo:**

- en unupersona ĉambro po 970 €
- en dupersona ĉambro po 770 € p.p.

## PK2 Zanzibaro

*10-a - 15-a aŭgusto*
*Sabato ĝis ĵaŭdo, 6 tagoj / 5 noktoj*

Por la longa postkongresa ekskurso ni invitas vin viziti Zanzibaron – insulon en Tanzanio, faman pro siaj belegaj ripozlokoj ĉe la maro. La programo enhavas kaj interesajn ekskursojn, kaj sufiĉe da libera tempo por povi plaĝumi kaj ripozi post la intensa kongresa semajno.

Tiu ĉi ekskurso komenciĝos sabate, la 10-an de aŭgusto vespere. Necesas alaĉeti flugbileton de Aruŝo al Zanzibaro, por helpo mendi la flugbileton bv. kontakti la Kongresan Fakon.

La ekskurso finiĝos la 15-an de aŭgusto posttagmeze en Zanzibaro, do bezonatas plani la alhejman vojaĝon de Zanzibaro.






**La prezo inkluzivas:**

- restadon en komfortaj 4-stelaj hoteloj;
- matenmanĝojn, tagmanĝojn kaj vespermanĝojn – ekde la vespermanĝo la 1-an tagon ĝis tagmanĝo la lastan tagon;
- ĉiun transporton dum la postkongreso en Zanzibaro;
- ĉiujn bezonatajn enirbiletojn;
- Esperantan interpretiston.

**La prezo ne inkluzivas:**

- la flugon al Zanzibaro (UEA helpos, se necese, mendi la plej konvenajn flugojn)
- tranokton la 15-an de aŭgusto (post la reveno de la ekskurso);
- hotelajn ekstraĵojn (ekz. trinkaĵojn en la hotelĉambra fridujeto);
- asekuron;
- trinkmonon al la loka gvidanto (rekomendinde 10 USD je tago/persono).

**10.08** Flugo de Aruŝo al Zanzibaro (ne inkluzivita), vespermanĝo, tranokto.

**11.08** Matenmanĝo, vizito de la urbo Zanzibaro kun tagmanĝo (Stone Town, merkatoj, domo de Freddie Mercury kaj aliaj vidindaĵoj), vespermanĝo, tranokto.
**12.08** Matenmanĝo, vizito de la spicfarmo kaj aliaj vidindaĵoj, tagmanĝo, translokiĝo al ĉemara hotelo, vespermanĝo, tranokto.
**13.08** Matenmanĝo, tuttaga boata ekskurso kun ĉiuj manĝoj, naĝado kun spirtubo (*snorkelling*), rigardo de delfenoj kaj aliaj aktivaĵoj, tranokto.
**14.08** Matenmanĝo, tuttaga plaĝumado, naĝado kaj ripozo kun ĉiuj manĝoj, tranokto.
**15.08** Matenmanĝo, forloĝiĝo de la hotelo, tagmanĝo, forveturo.

**Prezo:**
- en unupersona ĉambro po 1290 €
- en dupersona ĉambro po 990 € p.p.



# Ekskursoj dum la kongresa semajno
# Tuttagaj ekskursoj

**Ĉiuj tuttagaj ekskursoj inkluzivas:**
- vojaĝon per turisma bus(et)o aŭ terena aŭtomobilo de kaj al Aruŝo;
- tuttagan gvidanton en la angla kaj akompananton/tradukanton en Esperanto;
- tagmanĝon.

## E1 Termofontoj kaj kafplantejo

Vizito de termofontoj *Kikuletwa* – belega loko por ripozi kaj naĝi, situanta en arbaro. Ne forgesu kunporti naĝkostumon! Poste vin atendos tagmanĝo kun ĉagoj (loka tribo) kaj vizito de la kafplantejo, kie vi ekscios detalojn de kafproduktado kaj ankaŭ faros vian propran tason da kafo laŭ la tradicia maniero.



**Prezo: 79 €**

## E2 Serpentejo, akvofaloj kaj kafplantejo



Ĉu vi interesiĝas pri serpentoj? Jen la taŭga ekskurso por vi! Dum ĝi vi vizitos la Serpentan Parkon (*Meserani Snake Park*), kie vi havos la ŝancon vidi plurajn serpentojn kaj ekscii multe da interesaĵoj pri ili. Poste vi vizitos la akvofalojn *Osupuko* kun belegaj pejzaĝoj. Post la tagmanĝo, vi vizitos la kafplantejon, kie vi ekscios ĉiujn detalojn de kafproduktado kaj ankaŭ faros vian propran tason da kafo laŭ la tradicia maniero.

**Prezo: 67 €**

## E3 Nacia Parko Ngorongoro

Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos la krateron Ngorongoro – kie nun estas protektata areo kun riĉa faŭno. Tie vi veturos per specialaj aŭtoj kaj povos vidi leonojn, gazelojn, zebrojn, bubalojn kaj aliajn bestojn.

**Prezo: 179 €**



## E4 Nacia Parko Tarangire



Dum tiu ĉi safaria ekskurso vi vizitos la Nacian Parkon Tarangire, hejmon de majestaj baobaboj kaj abunda faŭno. Tie vi havos la ŝancon vidi multajn bestojn, inkluzive de elefantoj, leonoj, leopardoj kaj pli. Krome, vin atendos piknika tagmanĝo en la parko, kaj multaj belegaj pejzaĝoj.

**Prezo: 149 €**



## E5 Nacia Parko Lago Manjara (Lake Manyara)

Tiu ĉi nacia parko estas fama pro siaj abundaj akaciaj kaj mahagonaj arbaroj. Dum la safaria ekskurso, vi povos observi bubalojn, ĝirafojn, arbogrimpantajn leonojn kaj aliajn bestojn, kun paŭzo por piknika tagmanĝo. Se vi estos bonŝanca, vi vidos ankaŭ rozajn flamengojn!

**Prezo: 149 €**



## E6 Nacia Parko Aruŝa

La Aruŝa Nacia Parko estas la plej proksima al la kongresejo, ĝi troviĝas ĉe la monto Meru – la deka plej alta monto en Afriko. La belega parko estas hejmo por pluraj specoj de bestoj – ĝirafoj, bubaloj kaj aliaj. En la arbaroj vi havos la ŝancon vidi blank-nigrajn stumposimiojn, kaj ĉe la lagoj – rozajn flamengojn. Krom la veturo per safaraj aŭtoj, vin atendos piknika tagmanĝo kaj 2-3 hora pieda promeno tra la parko. La ekskurso ne taŭgas por homoj kun marŝproblemoj.

**Prezo: 170 €**



## E7 Masaja vilaĝo kaj Ĝirafa Centro

Dum tiu ĉi ekskurso vi vizitos vilaĝon de masajoj *Mto Wa Mbu* kun la gvidanto, kiu kreskis en tiu ĉi vilaĝo. Tie vi detale konatiĝos kun ilia kulturo kaj vizitos lokajn farmojn, lernejon, infanĝardenon, merkaton, muelejojn kaj aliaj lokojn. Post la tradicia tagmanĝo vin atendos ekskurso tra la Ĝirafa Centro. Ĝi estas loka organizo, kiu okupiĝas pri protektado de ĝirafoj – nacia besto de Tanzanio. Tie vi havos la ŝancon proksime vidi la ĝirafojn, kaj ankaŭ ekscios pri la historio kaj agado de la organizo.

**Prezo: 183 €**



## E8 Rigardo al Kilimanĝaro kaj vizito de naturrezervejo

Dum tiu ĉi ekskurso vi vizitos *Sanya Juu* – lokon kun mirindaj vidoj al la monto Kilimaĝaro. Ne forgesu fari multajn belajn fotojn! Post la piknika tagmanĝo vin atendos safaria ekskurso laŭ la naturrezervejo (*Serval Wildlife Sanctuary*), kie vi vidos servalojn, leonojn, ĝirafojn kaj aliajn bestojn en ilia natura vivejo.

**Prezo: 239 €**



## E9 Kilimanĝaro

Ĉu vi interesiĝas pri montara marŝado? Dum tiu ĉi tuttaga ekskurso vi marŝos laŭ la itinero *Marangu* kaj atingos la tendaron *Mandara* sur la monto Kilimanĝaro. Kilimanĝaro estas la plej alta monto de Afriko, ĝi havas kromnomon "Tegmento de Afriko". Ne maltrafu la ŝancon viziti ĝin!

Atentu! Tiu ĉi ekskurso ne gvidas al la pinto de Kilimanĝaro. Planata distanco estas 8 km, 3-4 horoj supren kaj 2-3 horoj malsupren. La ekskurso ne taŭgas por homoj kun marŝproblemoj.

**Prezo: 277 €**





# Duontagaj ekskursoj

## D1 Nacia Muzeo de Aruŝo kaj la artista strateto

***sabato, 3-a de aŭgusto, 14h00-16h30;***
***dimanĉo, 4-a de aŭgusto, 14h00-16h30,***
***lundo, 5-a de aŭgusto, 09h30-12h00;***
***mardo, 6-a de aŭgusto, 09h30-12h00, 15h00-17h30,***
***ĵaŭdo, 8-a de aŭgusto, 09h30-12h00, 15h00-17h30;***
***vendredo, 9-a de aŭgusto, 09h30-12h00, 15h00-17h30***

Tre proksimaj al la kongreso, kaj ambaŭ vizitindaj! La plej proksimaj ekskurso-lokoj de la ĉi-jara UK: nur 300m for de la kongresejo troviĝas la loka nacia muzeo de Aruŝo. Estos do eblo konatiĝi kun la urbo kaj lando, ekscii pri ties historio kaj la plej gravaj momentoj, personecoj kaj mirinda naturo.

Kaj eĉ pli proksima estas la "Artista strateto" (*Via via Artists´Market*) – nur 100m for de la kongresejo! Tiun ĉi lokon indas nepre viziti – eble eĉ kelkfoje dumkongrese. La artistoj rekte antaŭ viaj okuloj produktas siajn artaĵojn: pentristo, kudristino, drum-faristo… Ĉi tie estos eblo aĉeti belegajn suvenirojn rekte de la lokaj kreantoj – artistoj. Postekskurse bone taŭgos eta refreŝiĝo en la tuj apuda, ĉarma kafejo-drinkejo-manĝejo "Via via". Piedira ekskurso.

**Prezo: 10 €**

## D2 La centro de afrika kultura heredaĵo

***lundo, 5-a de aŭgusto, 09h15-13h00, 13h15-17h00;***
***mardo, 6-a de aŭgusto, 09h15-13h00, 13h15-17h00;***
***ĵaŭdo, 8-a de aŭgusto, 09h15-13h00, 13h15-17h00;***
***vendredo, 9-a de aŭgusto, 09h15-13h00, 13h15-17h00***

Nepre vizitinda loko en Aruŝo! La centro de afrika kultura heredaĵo ekestis en la jaro 1994. Ĝi estas la unua el sia speco en Afriko, dediĉita al esplorado de la riĉaj trezoroj de kulturo de Afriko. Ĉi tiu familia entrepreno estas la rezulto de kulmino de laborego, neŝancelebla dediĉo kaj scio akirita de la prapatroj. Tre alloga ankaŭ arkitekte, sed eĉ pli riĉa de ene – la centro enhavas milojn da artaĵoj (bildoj, statuoj, skulptaĵoj, maskoj, mebloj…), kolektitaj de la tuta Afriko. Kaj la granda pluso: ĉiuj ekspoziciaĵoj estas aĉeteblaj. La ĉefkonstruaĵo estas dizajnita por simili la Uhuru-pinton de Kilimanĝaro. La ekstero de la galerio estas prezentita per tamburo, ŝildo kaj lanco, ĉiuj gravaj afrikaj simboloj. La simboloj resonas kun la rolo de la galerio, kiu devas reprezenti, komuniki kaj festi la kulturan here-

daĵon de Afriko. Krom aliaj artaĵoj troveblas ankaŭ riĉa kolekto de tanzanitoj – valoraj, unikaj juvelŝtonoj de la apuda Mererani-montoj. La artgalerio ankaŭ havas amfiteatron, kiu ofte prezentas vivon de specialaj tanzaniaj triboj kiel la Masajoj, Pigmeoj kaj Hadzabe. La enspezo de la Galerio iras al la savado de elefantoj en Afriko. La centro ankaŭ havas restoracion, kafejon, spiccentron kaj kelkajn pliajn butikojn, kiuj ofertas diversajn artaĵojn kaj suvenirojn. Oni veturos per minibusetoj.




**Prezo: 15 €**

## D3 Muzeo de Tanzanitoj


***sabato, 3-a de aŭgusto, 11h00-12h30, 14h00-15h30;***
***dimanĉo, 4-a de aŭgusto, 13h15-14h45;***
***lundo, 5-a de aŭgusto, 09h00-10h30, 11h00-12h30, 14h00-15h30, 16h00-17h30;***
***mardo, 6-a de aŭgusto, 09h00-10h30, 11h00-12h30, 14h00-15h30, 16h00-17h30;***
***ĵaŭdo, 8-a de aŭgusto, 09h00-10h30, 11h00-12h30 ;***
***vendredo, 9-a de aŭgusto, 09h00-10h30, 11h00-12h30***

Por ŝatantoj de juveloj kaj/aŭ investantoj: vizitu la ĉarman muzeon-vendejon “Tanzanita sperto” (*Tanzanite Experience*) kaj lernu pri la historio, mistero kaj maloftaĵo de ĉi tiu altvalora ŝtono, unika kaj havebla nur en Tanzanio. Per serio de interagaj prezentoj kaj ekspoziciaĵoj, inkluzive de kopio de tanzanita min-ŝakto, vizitantoj malkovras, kiel tanzanito estis kreita, nomita, elminita, tranĉita, polurita kaj gradigita. Ankaŭ ekzistas la ŝanco aĉeti tanzaniton rekte de la fonto – en diversaj formoj, grandecoj,



valoroj. Ĉu por si, por familiano aŭ kiel interesan investaĵon. La muzeo situas en la centro de Aruŝo (nur 500m for de la kongresejo). Piedira ekskurso.

**Prezo: 5 €**



## D4 Masaja Merkato

*sabato, 3-a de aŭgusto, 14h00-16h30;*
*lundo, 5-a de aŭgusto, 14h00-16h30;*
*mardo, 6-a de aŭgusto, 09h00-11h30*

Ĉi tiu ekskurso taŭgas por vi nur en la kazo, ke:

- vi havas daŭre spacon en via valizo;
- vi emus porti hejmen diversajn unikajn suvenirojn;
- vi ŝatas afrikan arton kaj kulturon;
- vi ŝatas marĉandi;
- vi emas subteni lokajn artistojn;
- vi havas (daŭre) iom da tanzaniaj ŝilingoj kaj/aŭ dolaroj.

Tiu ĉi loko estas mirinda spaco kun pli ol 240 budoj, kie oni vendas ĉiajn ajn imageblajn suvenirojn (foje eĉ neimageblajn). La suveniroj kaj artaĵoj estas ofte vendataj rekte de la reala artisto, laboranta en la vendejo. Se oni volas veni al unu sola loko, kie koncentriĝas ĉiuj eblaj aŭtentikaj suveniroj de Tanzanio, por kunporti hejmen iom da afrika kulturo, tiu ĉi loko nepre devas eniri la tagordon de la kongresano. Krome – avantaĝas favoraj prezoj, aldone tiel per siaj aĉetoj helpante rekte la lokulojn. Tamen nepre ne forgesu marĉandi – tio apartenas al la loka kulturo – kaj povas signifi eĉ duonan aŭ trionan prezon, kompare kun la origina! Kalkulu do nepre kun bezonata spaco en via valizo por vojaĝi hejmen! Piedira ekskurso (1,1 km for de la kongresejo).



**Prezo: 5 €**

## D5 Masaja Festivalo

La detaloj pri ĉi-ekskurso aperos pli poste (La festivalo estas daŭre nur preparata). La ekskuso estas planata por ĵaŭdo kaj vendredo.



# Tabelo de dumkongresaj ekskursoj

**T = tuttaga ekskurso; M = duontaga ekskurso matene; P = duontaga ekskurso posttagmeze.**

| | Sab 3/08 | Dim 4/08 | Lun 5/08 | Mar 6/08 | Mer 7/08 | Ĵaŭ 8/08 | Ven 9/08 | **prezo, €** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E1 - Termofontoj kaj kafplantejo | | | T | T | T | T | T | **79** |
| E2 - Serpentejo, akvofaloj kaj kafplantejo | | | T | T | T | T | T | **67** |
| E3 - Nacia Parko Ngorongoro | | | T | T | T | T | T | **179** |
| E4 - Nacia Parko Tarangire | | | | | T | T | T | **149** |
| E5 - Nacia Parko Lago Manjara | | | | T | T | | T | **149** |
| E6 - Nacia Parko Aruŝa | | | T | T | T | T | T | **170** |
| E7 - Masaja vilaĝo kaj Ĝirafa Centro | | | T | T | T | | | **183** |
| E8 - Rigardo al Kilimanĝaro kaj vizito de naturrezervejo | | | T | | T | | | **239** |
| E9 - Kilimanĝaro | | | | | T | | | **277** |
| D1 - Nacia Muzeo de Aruŝo kaj la Artista strateto | P | P | M | M/P | | M/P | M/P | **10** |
| D2 - La centro de afrika kultura heredaĵo | | | M/P | M/P | | M/P | M/P | **15** |
| D3 - Muzeo de Tanzanitoj | M/P | P | M/P | M/P | | M/P | M/P | **5** |
| D4 - Masaja Merkato | P | | P | M | | | | **5** |
| D5 - Masaja Festivalo | | | | | | M/P | M/P | **?** |

# Bankedo

Informoj venos baldaŭ!



# Aranĝoj ĉirkaŭ la UK

**52-a Internacia Infana-adoleskanta Kongreseto (IIK),** okazos de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024 en Aruŝo, Tanzanio. Pliaj informoj: *https://iik.uea.org*

**57-a Kongreso de ILEI** okazos en Maceio, Brazilo, de la 20-a ĝis la 27-a de julio 2024. Pliaj informoj: *https://ilei.info*

**80-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)** okazos en Šventoji, Litovio, de la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2023. Pliaj informoj: *https://ijk2024.tejo.org*

# Pliaj informoj

### Disdonado de reklamiloj kaj informiloj

UK estas la plej bona okazo por informi la movadan publikon pri nova iniciato, speciala agado de via faka asocio, reklami novan eldonaĵon, fari donacon al ĉiuj kongresanoj, anonci renkontiĝon, kurson, varon ktp. Plej efike estas meti vian informilon en la dokumentujon, kiun ricevas ĉiu kongresano. Tiu servo kostas 275 € kaj necesas peti permeson de la Estraro de UEA (bv. kontakti la Kongresan fakon ĉe *kongresoj@co.uea.org*). Nenio rajtas esti distribuata kongreseje sen tiu permeso.

### Salonmendoj, standoj kaj budoj

Ĉiuj fakaj asocioj konataj de UEA ricevis mendilon pri salono por sia kunveno dum la UK. Salonmendoj devas atingi la Kongresan fakon ĝis la 30-a de aprilo 2024. Malfruajn mendojn oni traktas malprioritate kaj eblas postuli por ili ekstran lupagon. Salonon por kunveno ne povas mendi individuo (ekz. por prelego), sed nur asocio. Se via asocio ne ricevis la mendilon, bv. peti ĝin ĉe la konstanta adreso (*kongresoj@co.uea.org*).

Asocioj, movadoj, firmaoj, eldonejoj, revuoj aŭ grupoj, kiuj volas aparte informi, disdoni broŝurojn, kolekti kotizojn k.s., povas mendi standon aŭ lokon por instali sian budon dum la kongreso (400 €). La budon oni ne rajtas uzi por komercaj celoj (vendado de libroj, insignoj k.s.), sed jes por kolekti mendojn.

### Kongresa Libroservo

Jen unika okazo aktualigi vian bibliotekon: en la Kongresa Libroservo multaj novaj libroj estos unuafoje lanĉitaj kaj plurajn titolojn eblos aĉeti kun speciala rabato. Ĝi havas ekskluzivan rajton vendi librojn kaj aliajn esperantaĵojn dum la UK. Por vendigi viajn eldonaĵojn, necesas oferti ilin al la Libroservo de UEA (CO) minimume du monatojn antaŭ la kongreso.

### Pagmanieroj

Estas diversaj kontoj kaj manieroj per kiuj oni povas pagi siajn kongresajn mendojn. Elektu tiun, kiu estas por vi la plej oportuna. La pagojn por

mendoj faru rekte laŭ unu el jenaj manieroj:

**Via UEA-konto.** Vi povas plenigi vian UEA-konton per bankokarto pere de sistemo Stripe (ne forgesu mencii vian UEA-kodon) uzante tiun ĉi ligilon: *https://buy.stripe.com/3csbME9tz4qoaOc289*.

**Banko.** Per ĝiro al unu el jenaj kontoj, je la nomo de Universala Esperanto-Asocio:

- Nederlando: ABN AMRO-Bank, IBAN: NL86 ABNA 0426 9014 44 (BIC: ABNANL2A);
- Germanio: Postbank, IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09 (BIC: PBNKDEFF).

Monsendojn al ĉi tiuj du kontoj bv. fari nepre en eŭroj. Eventualajn administrajn bankokostojn ĉiam pagas la mendanto.

**PayPal.** Eblas pagi pere de PayPal uzante la adreson *financoj@co.uea.org*. Bv. aldoni 5% al la pagata sumo pro administraj kostoj.

### Asekuro

La kongreskotizo inkluzivas nenian asekuron: ĉiu aliĝinto zorgu mem pri taŭga vojaĝasekuro. La UK ne repagas mendojn (loĝado, ekskursoj k.a.) se la malmendo venas post la limdato. Tial estas konsilinde asekuri sin kontraŭ eventuala nepartopreno.

### Donacoj

La UK bonvenigas donacojn por:

**Ĝenerala Kaso:** por la ĝenerala subteno al la organizado de UK.

**Adoptaj Gepatroj:** subvencias partoprenon en la Infana Kongreseto de infanoj el landoj kun transpagaj problemoj.

**Fondaĵo Canuto:** helpas membrigon al UEA de esperantistoj el landoj kun transpagaj problemoj.

**Fondaĵo Partoprenu UK-on:** helpas al kongresanoj el triamondaj landoj.

**Blindula Kaso:** helpas al blindaj kongresanoj.

**Arta Kaso:** helpas financi artistojn por prezentiĝo dum Universalaj Kongresoj.

**Infana kongreseto:** helpas kovri kostojn de Internacia Infana Kongreseto.

**Klimato – $CO_2$ –** por ekologiaj projektoj, kompensantaj la poluadon, okazantan i.a. pro transportado de kongresanoj al UK.

Mencio pri ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro kaj en la revuo Esperanto.

# Sekvu nin ĉe:

- **Facebook @universala.esperanto.asocio**
- **Facebook @uk2024**
- **Telegram-grupo: *https://uk.telegramo.org***
- ***https://uk.esperanto.net/2024***

# Kontaktoj


Centra Oficejo de UEA, Kongresa Fako:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

**Ni petas kontakti nin ĉefe retpoŝte,
ĉe la retpoŝtadreso:**

## kongresoj@co.uea.org

Pri ĉiuj temoj rilataj al la Kongreso, bonvolu kontakti ne la LKK, sed la Kongresan Fakon.

*Enpaĝigo: Impeto*
*Kovrilfoto: https://www.pexels.com*
*Paĝoj 2-40: https://unsplash.com, arkivo de KF*




Ethiopian
የኢትዮጵያ

# Ethiopian Airlines – oficiala flugkompanio de la unua UK en Afriko

Ethiopian Airlines fariĝis sponsoro kaj la oficiala flugkompanio de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto. Kadre de tiu partnereco la flugkompanio proponas 15%-an rabaton por ĉiuj kongresanoj, flugontaj al la flughaveno Kilimanĝaro (JRO) en Tanzanio. La rabato ne validas por tarifoj eventuale jam rabatitaj.

Por ĝui tiun rabaton oni devas aĉeti siajn biletojn per ĉi-ligilo:
*https://www.ethiopianairlines.com/aa/event?Key=Esperanto-Universal-Kongress*



# 110-a Universala Kongreso de Esperanto atendas vin en 2025 en Brno, Ĉeĥio!



